

# Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 31.5.2012


## Venecio

*Bohumila Trzosobá*

### Laguno de Venecio

La Laguno de Venecio estas malgranda parto de Adriatiko (pli precize de ties Golfo de Venecio) apartigita de la ĉefparto de la maro per ĉeno el longecaj duoninsulo kaj insuloj. Tiu laguno situas en la nordorienta parto de Italio kaj estas vaste konata pro la urbo Venecio, kiu troviĝas sur kelkaj insuloj meze de ĝi.

**Venecio** (Reĝino de Adriatiko; urbo de lagunoj; urbo de akvo; urbo de lumo;) estas parto de Monda heredaĵo de UNESKO



Venecio (itale Venezia [venecja]) estas la ĉefurbo de la itala regiono Veneto fondita en la kvina jarcento. Ĝi enhavas 309.000 loĝantojn. En la urbo funkcias 4 universitatoj. En la urbocentro troviĝas proksimume 100 kanaletoj kun 400 pontoj. Kiun ajn lokon de la urbo oni povas atingi per piede dum duonhoro. La insularo de Venecio kuŝas sur teritorio de ĉ. 7 km<sup>2</sup>.

### Historio

En la 5-a kaj 6-a jarcentoj, en la epoko de la barbaraj invadadoj, la enloĝantoj de la romia urbo Aquileia fuĝis al la enmarĉa vilaĝeto Rialto [ˈrjalto]. Kvankam la nova komunumo estis laŭnome parto de la Bizanca imperio, la venecianoj estis fakte sendependaj jam en la 9-a jarcento. Kontinenten la Respubliko atingis la limojn de la Ŝtato de Milano, de la Papaj Ŝtatoj kaj de la Aŭstra imperio. En 1797 la Serenissima (Tre Serena Respubliko) perdis sian sendependecon pere de Aŭstrio. La loĝantaro nomis sin unue veneciano, nur due katoliko. La urbon la diversaj papoj almenaŭ trifoje anatemis en buleoj.

## Geografio

La koro de Venecio estas la 3800-metrojn-longa kaj 4-5 metrojn profunda akvovojo Granda Kanalo, kiu trafluas la tutan urbon inversa S-forme de la stacidomo (nord-okcidente) al la placo de Sankta Marko kun la samnoma baziliko (sude). De la Kanalo admireblas vico da belegaj palacoj, preĝejoj entute pr. 100 kaj pontoj. La kanalon transas nur kvar pontoj. Ĉiuj kvar kanalaj pontoj estas sufiĉe altaj por tralasi boatojn ankaŭ ĉe alta akvo; tial la kanalo estas grava akvovojo ĝuste dum periodoj de alta akvo, kiam boatoj ne povas pasi tra sub la pontoj de la malpli grandaj kanaloj. Sub la konstruaĵoj staras palafitoj el lariko, ĉar tiu ĉi arbo ne putriĝas sub la akvo. La palafitoj estas en la tero 8 metrojn profunde. La fundamentoj de la konstruaĵoj estas konstruitaj el kalkŝtonoj de Istrio.

Ponto de Rialto estas unu el la kvar pontoj, kiuj transas la akvovojon Canal Grande en Venecio. Ĝi estas la plej centra, la plej malnova kaj sendube la plej fama inter la pontoj. Ĝian nunan nomon donis la subkvartalo Rialto, oriente de ĝi. En la jaro 1250 ĝi estis anstataŭigita per ligna ponto. Ĝia strukturo konsistis el du deklivaj rampoj, kiuj atingis centran moveblan sekcion, leveblan por ebligi la trapason de altaj ŝipoj.

La Placo de Sankta Marko estas aŭtentika majstraĵo de la Eŭropa arkitekturo. Oni ĝin nomas „la loĝoĉambro de la venecianoj“. La bizanca Baziliko de sankta Marko gastigas la mortrestaĵon de la patrono Sankta Marko la evangelisto. Ĉe la dekstra flanko de la baziliko staras la Doĝa Palaco. Inter la aliaj preĝejoj troviĝas la Salute (Savo de la pesto).

Inter la multaj muzeoj troviĝas muzeo Correr.

Allogas ankaŭ kelkaj aparte situantaj insuletoj, kiel ekzemple Murano.

## Legendoj

Sur domo ĉe la ponto estas statuo de flugilhava virino, kiu sidas sur ardantaj karboj. Popola legendo diras, ke ŝi vetis, ke neniam oni povos konstrui ponton sur Canal Grande. Ŝi perdis la veton kaj nun eterne devas sidi sur ardantaj karboj.

Oni forportis la filozofon/monaĥon Giordano Bruno el Venecio en 1592, kaj brulmortigis lin 8 jarojn pli poste.

En la baroka periodo Casanova kun monaĥinoj seksumis en la urbo.

## Esperanto

En 1923 estis en Venecio la Unua Internacia Konferenco por Helplingvo en Komercio kaj Turismo, kies aranĝon helpis Itala Esperanto-Federacio. Dum la

sama jaro, la loka Esperanta grupo "L. L. Zamenhof" eldonis libron Gvidlibro tra Venecio. Antaŭparolon al la libro verkis profesoro Ivo Vianello.

## **Baziliko de Sankta Marko**

La Baziliko de Sankta Marko en Venecio estas la katedralo de la venecia patriarko. La unua kirko dediĉita al sankta Marko estis fondita en 828 kaj konstruita inter 829 – 832 sur loko de domkapelo de la doĝa palaco por akcepti la ostojn de Sankta Marko el Aleksandrio. En 976 okazis incendio, en kiu neniigis la kirko, doĝa palaco kaj 200 domoj. Samjare komencis la doĝo Pietro 1-a Orseolo la rekonstruon, kiu post pluraj interrompoj finiĝis nur en 1094. La striktaj rilatoj de Venecio al oriento kaŭzis, ke la konstrulaboroj okazis laŭ bizanca ekzemplo. Originale ĝi estis romana brika baziliko, sed post alkonstruo de flankaj ŝipoj en 1063 akiras ĝi la nunan formon. La alkonstruoj okazis en la 13-a jc. laŭ bizanca en la 14-a jc laŭ gotika stilo.

La preĝejan fasadon kaj internon ornamas pli ol 500 antikvaj kolonoj el marmoro, porfiro, jaspo, serpenteno kaj alabasto. La orbazaj mozaikoj portis la nomon por la katedralo „Ora Baziliko“.

Laŭ bizanca ekzemplo posedas la preĝejo vestiblon, kies mozaika ornamaĵo (1220-1290) montras scenojn el la Malnova testamento. La preĝeja spaco estas dividita per 4 kolonegoj kaj ses kolonoj je tri navoj. Sur la kolonegoj apogiĝas la 5 kupoloj.

## **Trafiko en Venecio**

La trafiko en la itala urbo Venecio estas iusence unika pro jenaj cirkonstancoj:

- La urbo konsistas el multaj insuloj en la Laguno de Venecio, dividitaj per kanaloj, tre malsamaj laŭ larĝo, profundo kaj – pro la multaj pontoj – alto disponebla por boatoj.
- Multaj el tiuj insuloj tiom interproksimas, ke kelkmetra ponto facile ligas ilin. Tamen multaj el la pontoj ne eltenus aŭton; krome ili kutime havas ŝtupojn por lasi pli altan spacon al pasantaj boatoj, do ili ne taŭgas por veturiloj.
- Plurfoje jare alta akvo atakas la urbon kaj dumaniere malfaciligas la trafikon:
- Ĝi subakvigas multajn vojojn kaj ĝi altigas la akvonivelon en la kanaloj kaj tiel reduktas la liberan spacon sub la pontoj.

Piedirado: La piedira trafiko plej gravas en Venecio. Eblas piede atingi multajn lokojn en akceptebla tempo, ĉar la plej granda distanco sur la ĉefaj insularoj estas nur ĉ. kvar kilometroj. Tamen piede ne eblas atingi la aliajn insulojn de la laguno.

Pontoj estas esenca bazo de la piedira trafiko; la plej multaj pontoj estas malaltaj kaj sur mallarĝaj kanaloj.

Aŭtoj povas atingi la urbon Venecio per ponto, sed tuj poste devas halti en la parkejoj de sur insulo Tronchetto. Estus senutile pluveturi per aŭto; la vojoj ne estas faritaj por veturiloj. Preskaŭ ĉiuj pontoj havas ŝtupojn kaj multaj ne eltenus la pezon de aŭto.

Eĉ polico kaj fajrobrigado en Venecio ne havas aŭtojn, sed boatojn. Avantaĝo de la fajrobrigado estas, ke ĉie disponeblas (mara) akvo por estingi fajron. Ĝi eĉ ne estas tre sala.

Fervojo povas atingi Venecion per ponto same kiel aŭtoj, sed same devas halti ĉe la okcidenta fino.

Boatoj estas la plej konvenaj transportiloj en Venecio, ĉar preskaŭ ĉie preterpasas kanalo. Ĉiuj transportoj de iom pezaj varoj estas farataj per boatoj.

## **Gondoloj**

Venecio famas interalie pro siaj gondoloj, barketoj longaj kaj sveltaj, kiujn la barkisto pelas per unusola remilo. Ili estas konataj kiel transportilo por revantaj geamantoj, sed servas ankaŭ kiel tute ordinaraj taksioj. La gondolisto kutime staras, sed lerte kliniĝas antaŭ pasotaj pontoj.

Samkiel aliaj urboj havas publikajn aŭtobusojn, Venecio havas publikajn boatojn, kiuj servas fiksitajn liniojn. Ili nomiĝas vaporetto (vaporŝipeto), sed ili nun funkcias perdizelaj motoroj. Ĉar estas mallongaj distancoj inter la haltejoj, ili havas apartan proceduron de alteriĝo: Kiam la boato proksimiĝas al la haltejo, la du konduktoj ĵetas ŝnuromaŝon al surteraj teniloj kaj tiel haltigas la boaton, kies motoro restas kuranta.

Ĉaroj: Kie necesas transporti varojn sur teraj vojoj, servas varĉareto. Ili havas grandajn radojn kaj aldonajn radetojn por grimpi la pontajn ŝtupojn. La ĉaristoj ne rajtas parki siajn ĉarojn sur publikaj vojoj.

Karnavalo en plej ofte katolikaj landoj estas festaj tagoj, kiam oni festegas kaj eble diboĉas antaŭ la pentado kaj fasto de la sekvaj kvardek tagoj da Karesmo. En Venecio, maskitaj homoj en elegantegaj vestoj festas kaj balas.



Venecia lingvo estas lingvo parolata en la regiono Veneto, en la provinco Trento kaj en kelkaj lokoj en la regiono Friulo-Venecio Julia en Italio, en Istrio kaj Dalmatio. Komunumoj de parolantoj estas ankaŭ en kelkaj lokoj en Argentino, Aŭstralio, Brazilo, Florido, Kalifornio, Brita Kolumbio, Meksiko, Ontario, Usono, kien multe Venecianoj emigris.

Ĝi estas unu de romanaj lingvoj opiniata kiel la dialekto de la itala lingvo. Ĝi konsistas tamen sian propran morfologion, sintakson kaj leksikonon. Ĝi estas hodiaŭ uzata per kelkaj milionoj da homoj.

Esperantaj vortoj el la venecia lingvo: ĉaŭ, doĝo, gazeto, geto, Montenegro ...